



Katalin Kováts pri "La plej bona ideo por ĉiuj"

Kion vi farus, se ekde morgaŭ nek vi nek iu ajn alia persono rajtus paroli en Esperanto? Se la lingvo ekde morgaŭ ne plu ekzistus? - tion demandis al ni Sanne Nouws, juna teatra reĝisorino dum sia vizito en nia hejmo. Nia tuta familio senhezite respondis same: tio ne povus okazi kaj se tamen, ni plu parolus ĝin, ja ĝi estas nia vivo, nia komuna lingvo.

La 16an de marto kun scivolo mi veturis al Den Bosch, nederlanda urbo, kie dum la Kultura festivalo CEMENT unu el la teatraĵoj temis pri Esperanto, pli precize pri la



entombigo de Esperanto, "La plej bona ideo por ĉiuj".

La teatraĵon la grupo prezentis 5 fojojn. Por la premiero ne plu eblis aĉeti biletojn.

En la atendejo svarmis la homoj, precipe gejunuloj, sed ankaŭ kelkaj pli aĝaj, ĉiuj kun intereso. Pro nia

esperantlingva interparolo kun Rob Moerbeek ni tuj allogis kelkajn interesiĝantojn, eĉ ĵurnaliston.

Plenis la salono, la podio staris en angulo kaj la publiko sidiĝis sur seĝojn, kiuj estis aranĝitaj en blokoj, kelkaj ĉirkaŭ tablo, aliaj en vicoj. La aranĝo tuj sugestis, ke estos interagaj partoj, kaj eble eĉ postentombiga funebra manĝo. Mi sidis proksime al la podio por vidi ne nur la aktorojn, sed ankaŭ la tutan publikon. Kelkaj seĝoj, kiuj havis la surskribon "Rezervita" restis malplenaj. Inteligenta publiko.

Kaj komenciĝis.... Nina, la ĉeforganizanto de la ceremonio per "Mi petas vin ekstarti" atingis sian celon. La ĉeestantoj komprenis la mangeston kaj transprenis la etoson, komence kun iom da ridetoj, sed fine kun inda patoso provis kunzumadi la Esperanto-himnon. Ĝin la kvar aktoroj, en la muzika aranĝo de Gunnar, unu el ili, kunkantis parkere, multe pli bone ol oni aŭdas tion en veraj Esperanto-aranĝoj, inklude ankaŭ kongresojn. Nu jes, almenaŭ je la entombigo indus fine koni unu el la ĉefaj simboloj de la movado.

Tute hazarde, ĝuste apud mi, maljuna sinjoro, vestita tute inde al tia ceremonio, kunkantis, evidente konante la teskton. Ŝajne la tri "familianoj", Rob mi kaj li, plene koncernitaj, instinkte trovis unu la aliajn. Fine mi eksciis, ke la sinjoro estis *Willem Bruijnesteijn van Coppenraet* el Arnhem, iama prezidanto de la nederlanda Esperanto-Asocio, ne plu aganta en la lastaj 40 jaroj, kaj nekonata eĉ al tia veterano kiel Rob Moerbeek.



Je la komenco, antaŭ la *Bonveniga parolado* venis instrukcioj, kompletigo de la retadresa listo, ĉirkaŭirigo de bondezirkarto, sendota al iu *Erik*, kiu devintus ĉeestis, sed enhospitaliĝis pro apopleksio. Kelkaj ridetis, sur la vizaĝo de aliaj videblis timeto: ĉu la tuto okazos en tiu nekomprenebla lingvo? Sed oni obeis, skribis kaj pludonis la dokumentojn.

Bram, videble la plej fervora batalanto, komencinte la "*Bonvenigan paroladon*" baldaŭ konstatis, ke oni ne komprenas lin. Post hezitplena diskuto ili decidis daŭrigi en la naciaj lingvoj: nederlanda/flandra pro Nina kaj Bram, hispana pro Camilla el Urugvajo, islanda pro Gunnar, kaj angle por ĉiuj aliaj, por la publiko. Vera Babelo,



▲ De acteurs: Camilla Romero Lema, Bram van der Kelen, Nina Fokker en Gunnar Gunnsteinsson © Chris Korsten

House of Nouws brengt Esperanto volledig tot leven tijdens begrafenisceremonie

centmaniere. Ŝia Esperanto estus bona, sed ne la nederlanda. Bram ofte devas ŝin interpreti kaj la direndaĵoj kripliĝas. La festo iras plu. Fervora omaĝo de Bram pri Esperanto, Zamenhof, la unua lingvo kaj la unua kongreso. Nina vane volis plurfoje interrompi, Bram estis aŭtenta, kiel ni, esperantistoj, ne povis ĉesi. Oni aŭdis ankaŭ la voĉon de "Erik" pri Esperanto kaj dume videblis projekciitaj dekoj da fotoj pri esperantistoj el ĉiuj mondpartoj, amasoj, viglaj kaj vivaj homoj... .

Sekvas kelkaj pliaj situacioj pri "miskomunikado", inter ili amkonfeso de Camilla al Gunnar, la "komencanto", kiu reciproki ĝin kapablas nur en la islanda. Longe,

kompleta kaoso kiam Nina provis traduki ĉion al la angla kaj la tri aliaj parolis samtempe, ĉiu en sia lingvo.

Ridetoj, konfuzo, ridoj... . Do, tiom da lingvoj estis tro. Kion fari? Elimini la islandan, ja estas nur unu persono en la salono, altega de pli ol 2 metrojn, tamen parolanto de "minoritata", malgranda lingvo. Gunnar reiras al la piano, trista. Sentebblas la kompatato de la publiko.

La programo pluiras per monologo "*Esti aŭ ne esti*", poste per fizika poemo de Camilla, senvorta kaj komprenebla certe

emociplene, sed kion li diras? Camilla tuŝite, sed nur per unu vorto povas reagi per "Gracias" kaj oni eĉ tion pridubas, ĉu Gunnar kaptis la sencon de la danko. Bram havis denove fervoran monologon kontraŭ la angla (sed en la angla por ke ĉiu komprenu), pri ĝiaj politika maljusteco kaj lingva netaŭgco por esti la pontolingvo. Por pruvi, ke Esperanto pli facilas, la publiko ricevas muzikan, rep-ecan lecionon pri numeraloj.

Sed kio pri la entombigo, kie estas la mortkondamnito?

Oni preparas la ejon, la tablon por la ĉerko, kaj post meditiga muzikpeco ĉiu ricevas surfolie la tekston de la Himno.

La kadra strukturo de la teatraĵo sentigas la baldaŭan alvenon de la fino.

Ni ekstaras kaj kantas la Himnon, kune, aktoroj kaj publiko.... sed subite Gunnar ĉesas muziki... sabotas la neniigon de Esperanto kaj la publiko scias, ke li ne volas

perdi la komunan lingvon kun Camilla. Ĝuste li, kiu ankoraŭ eĉ ne regas bone Esperanton,

eksentas ĝian nehaveblecon.

Diskuto, disputo. La fervorulo tamen devas plenumi la taskon kaj la ĝis nun *plej verda rolanto*, frustriginte pro la nekomprene de la publiko, ("malobstine kaj senpacience" do, malzamenhofe) kriega insistas pri la neceso "halti pri Esperanto".



Oni enportas la ĉerkon, fakte blankardecan strukturon kun stokitaj Esperanto-libroj kaj verdaj plantoj kaj kun iu mistera objekto fine de la instalaĵo. Ĝi estis la "gilotino". Oni rapide reprenas la disdonitajn foliojn de la publiko kaj per la maŝino kruele, folion post folio, neniigas la Himnon, la simbolon de Esperanto, la plej bonan ideon por ĉiuj.

Sed kial oni mortigis la lingvon, kial la aŭtoro ne cedis al la peto de kompatindaj Gunnar kaj Camilla? -

demandis min ĵurnalisto de la regiona taggazeto.

Ĉu vi bedaŭras, ke ili faris? - demandas mi reen.

La plimulto de la publiko venis nenion scianta pri Esperanto, multaj eble konvinkiĝis dum la prezento pri ĝiaj rolo kaj utilo, kaj ŝoke travivis la perdon de tio, kion ili eĉ ne konis aŭ posedis antaŭe. Bedaŭri la perdon de io nehavebla povas gvidi al kompleta rezigno, sed ofte kaŭzas rilbelon, la fortan volon tamen provi, tamen voli havi. La tristeco pri maleblo profiti el io bonega.... eble kreos proteston, igos la homojn serĉi, ekkoni.... tamen lerni... Eble.





Fine de la teatraĵo en la atendejo la ĉeestaj esperantistoj estis ĉirkaŭataj, pluraj deziris aŭdi la lingvon, scii pli pri ĝi.

La festivala reta kaj paperforma novaĵorgano aperigis intervjuojn pri la lingvo kun la aŭtorino kaj reĝisorino kaj kun sperta, "mondkonata lingvoinstruisto". En la ejo informiloj kontentigis la ĵus naskiĝintan scivolemon.

Dum tuta semajno la retejo de la festivalo daŭre aperigis informojn pri Esperanto, kaj en la unua paĝo de la retejo de la regiona nederlanda gazeto eĉ post pluraj tagoj kun foto kaj titolo pri Esperanto videblis pozitiva artikolo.

Sanne Nouws, la juna reĝisorino, ne esperantisto, serĉante bonan solvon por sukcesa komunikado de diversanaciaj kaj diverskulturaj homoj, venis al la solvo, al Esperanto. Ŝi faris seriozan serĉlaboron antaŭ ol verki la scenarion, vizitis kaj intervjuis dekon da esperantistoj, kolektis informojn, provis ekkoni la movadon kaj ties idealojn, kiel ankaŭ la lingvon mem. La junaj aktoroj ricevis lecionojn pri prononcado kaj lernis etan bazon de la lingvo. Kaj lernis vere la Himnon, pro kio fine de la premiero mi mem transdonis antaŭ la publiko al ili atestilon, pli frue akiritajn de Hori Jasuo el Japanio.

La teatraĵo post la festivalo estos somere ankoraŭ dufoje prezentita en Nederlando, kaj havos ankaŭ ne-komerccelan, sed tamen spekteblan filmitan version.



La tuta produkto estas granda agnosko de la lingvo. Nia movado dankemas al la junuloj por ilia laboro. Sed la vera agnosko estos kiam ili mem en la privata vivo restos simpatiantoj kaj malkovros, ke Esperanto estas vere la plej bona ideo por ĉiuj, ankaŭ por ili.



Postnotoj:

Bedaŭrinde pro granda Esperanto-arango de nederlandaj esperantistoj, nome pro la printempa studsemjanfino, kie ĉeestis plurdekoj da esperantistoj, en la festivala prezento esperantistoj ĉeestis nur en tre limigita nombro.

Tamen dudeko da aktivuloj iel involvis sin en la preparlaboroj donante informojn, konkretajn helpojn.

- **Ans Bakker kaj Katalin Kovats** ĉeestis la ĉefprovon kaj konsilis la aktorojn,
- **Bert de Wit** tradukis la esperantlingvajn partojn de la teatraĵo,
- **Katalin Kovats** kontribuis per lingvaj helpoj, ekzercigis al la aktoroj la prononcadon kaj la tekstojn, disponigis flagon, multajn fotojn por la prezento kaj disdonis sian libron *Poŝamiko* al ĉiuj kunlaborantoj de la teatraĵa prezento kaj al pluraj publikanoj kaj ĵurnalistoj de la premiero.

Pliaj informoj, fontoj:

Enkonduka filmeto kun Sanne, la reĝisorino: https://www.youtube.com/watch?time_continue=153&v=ykn9CmbNKv4

Retejo de la ĵurnalo de la festivalo: <https://www.festivalcement.nl/festivalkrant-%E2%80%9918/>

Intervjuo kun Sanne: <https://www.festivalcement.nl/festivalkrant-%E2%80%9918/id-5892/%E2%80%98het-zijn-de-idealen-van-esperanto-die-de-taal-belet-om-groter-te-worden%E2%80%99/>

Intervjuo kun Katalin: <https://www.festivalcement.nl/festivalkrant-%E2%80%9918/id-5894/%E2%80%98ik-hoop-dat-de-wereld-niet-te-lang-wacht-om-esperanto-het-beste-idee-voor-iedereen-te-vinden%E2%80%99/>

Raporto de regiona gazeto DagBlad: <https://www.bd.nl/den-bosch-e-o/house-of-nouws-brengt-esperanto-volledig-tot-leven-tijdens-begrafenisceremonie-a3563c89/>